



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 6  
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
38-a (43-a) jaro  
Monata

## LA MALŜLOSILO

Ni atendis dum jaroj. Fine ĝi estas preta. La Malŝlosilo. Ĝi devas malŝlosi la vojon al scio de Esperanto — kaj efektive devas esti pli efika ol la tradicia ŝlosilo. Sed vidu jen: la vorto «ŝlosilo» fariĝis — malgraŭ sia vera signifo — simbolo kaj nacio: la ilo kiu ankaŭ malŝlosas!

Tiuj malsolenaj, sed tamen seriozaj, linioj enkonduku artikolon frontpaĝan pri la Malŝlosilo. Stranga loko por recenzo? Jes, sed ĉi tiu libreto estas evento en nia «historio». Post la milito ni ne havis tian helpilon.

«Ordliste Norsk—Esperanto» estas la modesta titolo de modesta libreto ne tre bela. Inter la flavecakaj kovriloj troviĝas 64 paĝoj, kiuj vere ne estas modestaj.

Post mallonga antaŭparolo, kie la aŭtoro inter alie prezentas sian dankon por meritplena laboro al Olav Rygg kaj al gesinjoroj Aase kaj Kjell Gustavsen, li donas dupaĝan liston pri kelkaj internaciaj vortoj, antaŭ ol ataki la alfabeton.

Ĉu mi ne menciis la nomon de la aŭtoro? Ĉu tio vere estas necesa? Ĉu ne

ĉiu esperantisto en Norvegujo scias, ke Rolf Bugge-Paulsen estas la homo, kiu dum jaroj diligentis pri la Malŝlosilo?

Antaŭ la ekuzo de la libreto oni devas tralegi, sur la lastaj paĝoj, la listojn pri mallongigoj. Se oni majstras ĉi tiujn mallongigojn, la Malsloŝilo estas jam taŭga vortaro, ĉar la mallongigoj, kiuj klarigas kaj diferencigas, estas necesaj. Ili estas necesaj ne nur, por ke la libro ne ŝvelu kaj multekostiĝu (parenteze: ĝi kosta 7,50 kronojn), sed ili estas necesaj, por ke oni povu ĝuste kaj inteligente uzi la flekseblan instrumenton multeblecan, kiu estas nia Internacia Lingvo.

Tre utila aldono estas la listo pri nomoj de landoj kaj popoloj. Utilaj estas ankaŭ, por tiuj, kiuj varbocele aŭ informe deziras citi, la plej lastaj paĝoj, kiuj prezentas eldirojn de famuloj (i.a. Willy Brandt, Albert Einstein, Johan Falkberget, Thor Heyerdahl, Udo Jürgen, nur por menciigi personojn el tre diversaj medioj).

Mi ankoraŭ ne tuŝis la Vortaron. Pardonu min, ke mi ne ĉasis preserarojn aŭ strangaĵojn — mi ne scias, ĉu tiaj ek-

zistas — sed mi trovas pli grave, en ĉi tia artikolo, informi pri la amplekso de la vortaro. La norvegaj vortoj estas pli ol kvar mil (la ordinara ŝlosilo enhavas preskaŭ 2 500 Esperantajn vortojn). La ĉiutagaj vortoj ĉeestas — kaj ĝuste ili postulas la menciitajn mallongigojn. Cetere la vortoj estas elektitaj laŭ la ekzistantaj listoj pri la ofteco de la Esperantaj vortoj, kio klarigas la longan tempon, kiun postulis la verkado de la libro. Tiu «baza vortaro» konsistas el 1200 vortoj. Aldone al tiuj 1200 vortoj aperas ankaŭ vortoj, kiuj en la naciaj

lingvoj estas derivaĵoj de la 1200, kio pligrandigas la nombron de la norvegaj vortoj. Ankaŭ kunmetaĵoj estas donitaj.

Antaŭ ol mi estos dum kelka tempo vere uzinta la Malŝlosilon, mi kompreneble ne povas kompentente ĝin prijuĝi. Sed jam unuhora pristudado konvinkis min, ke ĝi estas tre utila kaj tre solida. Mi kore bonvenigas ĝin inter niajn helpilojn, kaj same kore gratulas al ĝia aŭtoro Bugge-Paulsen kaj al Eldonejo Esperanto, kiu prizorgis la aperigon.

*Johan Hammond Rosbach.*

## La Diamanto

*La ĉefurbo de la diamantoj estas Londono. Tie oni traktas ĉiujn diamantojn produktitajn en Sudafriko. Oni pecigas ilin laŭ la koloro, la pureco kaj la pezo. Al la komercistoj la diamantoj estas prezentataj porcie, tiel ke oni ne povas elekti la plej belajn ŝtonojn. La pago ĉiam okazas kontante. Nun la diamantoj ricevas siajn ŝtetojn. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj Amsterdamo estis la centro de tiu speciala metio; hodiaŭ la nederlandan ĉefurbon superas tiurilate la belga urbo Antverpeno. Aliaj firmoj, kiuj specialigis sin pri tio, troviĝas en Ĉikago, Londono kaj Tel-Avivo.*

*Et partisipp* er en adjektivsk form av verbet. Når partisippet brukes som et adjektiv, må det derfor også bøyes som et adjektiv. Således får partisippene flertallsendelse: La dimantoj estas produktita-J en Sudafriko, og akkusativendelse når de står i objektsforhold: Oni traktas la diamantojn produktitaj-N.

*Bestemt* artikkel bør brukes flere steder hvor vi ikke bruker den på norsk: man deler diamantene etter farve, renhet og vekt. Det er her tale om den bestemte farve, enhet og vekt (eller de bestemte farver . . .), og da skal man også bruke den bestemte artikkel. Det er ofte vi på norsk har artikkellose uttrykk, som f. eks. neste gang (neste gang vi møtes er bestemt, idet det gjelder et bestemt tilfelle, selv om ikke møtet eller tidspunktet er bestemt).

*Understreke ved ordstilling* kan man godt gjøre på Esperanto. Men man skal huske på at man understreker ved å sette et ord sist i setningen: Amsterdam overgås av Antwerpen; denne understrekning blir enda sterkere når setningen kommer i passiv, og ordstillingen blir mere påfallende. Dette kan man så meget bedre gjøre på Esperanto enn på norsk fordi Esperanto her har N-formen som umuliggjør misforståelser.

## Norvega Esperantisto

### ESPERANTOBLADET

*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

*Adreso de la redakcio:* Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

*Abonprezo:* En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,—,  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,  
1/8 p. kr. 20,—.

de Norvega Esperantisto lastatempe grave plialtigis. Tio ĉi danĝere ŝancelas la budĝeton de N.E.L.

La Ligo Estraro nun direktas sinceran peton al ĉiuj niaj bonkoraj fideluloj: bonvolu sendi kontribuadojn por la kontorfondado. La oficejo estas la koro de nia agado!

*La Liga Estraro.*

*La kontorfondado.*

Pli frue .....	kr. 1 062,00
R. Bugge-Paulsen .....	» 30,00
C. S. B. ....	» 10,00
	-----
	kr. 1 102,00

## Ĉu la membroj forĝesis nin?

La donacoj al la kontorfondado efektive estas la bazo, kiu portas nian oficejon. En 1970 la donacoj sumiĝis je kr. 2 043, en 1971 je kr. 1 709, sed en 1972 ĝis nun nur kr. 1 102. Bedaŭrinde la luprezoj ne malkreskis, kaj la prezo de la elektro kreskis. Ankaŭ la preskosto

*Kampanjo Reisetar 1972.*

Pli frue .....	kr. 1 700,00
Gerd Jæger .....	» 100,00
	-----
	kr. 1 800,00

*Membro subtenanta 1972:*

John Selbekk.

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

## Sciigoj de N.E.L.

*Kursoj.* Ankaŭ dum la venonta printempa jaruono ĉiuj kluboj devas absolute aranĝi kursojn por komencantoj, precipe la kluboj, kiuj ne starigis kursojn dum la aŭtuno. Ankaŭ rektaj membroj povas sukcese aranĝi kursojn. Estas jam tempo plani la kursojn por la venonta printempa sezono. Sen kursoj neniuj progresoj!

*Korespondaj kursoj.* La reviziita elementa parto de la kurso baldaŭ aperos. Tiam ankaŭ la prezoj estos reviziitaj. Sed ni provizore povas liveri la kursojn por la ĝisnunaj malaltaj prezoj: parto I kr. 23,00, parto II kr. 25,00, ambaŭ partoj kune kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume

5 anoj la prezoj estas kr. 17,00, 19,00, 32,00. Varbu kursanojn en lokoj, kie ne okazas aliaj kursoj!

*Gazeta kurso.* Klopodu igi gazeton en via loko aperigi nian gazetan kurson. Ĝi estas havebla ankaŭ por gazetoj ofsete presataj. Petu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono.

*Prelegoj.* Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi sian kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

*Januaro:* La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkularaporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj ĝenerale la printempan agadon, pritraktas la jarraporton, kalkularaporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba alvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A10/E1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

*La Liga Estraro.*

## DONACOJ

S-ro Fin Hole en Mandal skribas en letero al la redaktoro, ke li admiras ĉiujn, kiuj aktive laboradas por Esperanto. Li legis en Norvega Esperantisto, ke ni daŭre kolektas poŝtmarkojn por fortikigi nian ekonomion. Tial li sendis grandan pakajon da poŝtmarkoj, kiujn la redaktoro nun iom post iom monigos. Ni kore dankas pro la valora donaco!

La Esperanto-klubo en Bodø konsistas ĉefe el maljunaj membroj, sed du pli junaj plus unu gimnaziano donas esperon pri daŭra laboro. En siaj kunvenoj la klubanoj en Bodø kolektis uzitajn poŝtmarkojn por nia gazeto, ordigis ilin (dankon!) kaj sendis pakajegon al Sarpsborg, kie ankaŭ tiuj markoj iom post iom moniĝos. Koran dankon!

*JHR.*

## LA KLUBA ŜAKLUDO

Ĉiuj kluboj en la lando — tamen la plej nova ankoraŭ ne — ricevis de la redakcio ŝaktabulon, kiu estas speco de loterio. Oni aĉetu kvadratojn, kiuj kostas po 10 kronoj. La monon oni sendu al la redakcio en Sarpsborg, kie krono post krono sumiĝas por helpi la ekonomion de la gazeto (nun ni devos denove pagi pli altan prezon por la presado). Ĉe la redaktoro ekzistas listoj (unu por ĉiu klubo) pri premioj, entute 27 premioj por ĉiu ŝaktabulo. *Tial oni sendu nur la nomojn de la kvadratoj aĉetitaj (A1, B3 ktp.),* kaj la premioj venos al la sendinto de la mono. Ĝis nun nur kvar kluboj partoprenis la ŝakludon — kaj havigis multan monon en la kaso. Koran dankon! Ni nun atendas la aliajn klubojn, kaj ni ankaŭ invitas la jam ludintajn klubojn daŭrigi la ludon. Unu gajniton ricevis belegan Esperantan libron, alia ricevis dikan tapiŝon. Kaj multaj premioj restas. Kompreneble ne ĉiuj premioj valoras dek kronojn, sed kelkaj valoras kvindek. (Kaj kelkaj nur unu). Novaj ŝaktabuloj estas ĉiam haveblaj ĉe la redaktoro. Demando: Ĉu unuopaj esperantistoj en senklubaj lokoj povus iel organizi sin kaj partopreni la ludon? *Red.*

## UNESKO-novajoj

EKSPERTOJ RENKONTIĜAS POR DISKUTI TUTEŬROPAN KOOPERADON EN SCIENCPOLITIKO

Kun temo «Kooperado eŭropa en Sciencpolitiko» ekspertoj el la okcidenta kaj orienta Eŭropo aranĝis diskutojn de la 4a ĝis la 7a de julio en Budapeŝto. Oni

proponis kompari metodojn de planado, ciklojn de esplorado-pliboniga-produktado, la aplikon de metodoj de administrado, kaj konsideri la eblecojn de plia tuteŭropa kooperado en sciencpolitikaj aferoj.

\*

## ALVOKO AL LA KONSCIENCO DE REGISTAROJ?

Dum konferenco de eldonistoj en la ĉefejo de Unesko en Parizo, ero de la Internacia Jaro de la Libro, S-ro Robert L. Bernstein el Usono rimarkigis, ke grava obstaklo al la devo de internacia komunikado estas la limigo de libera esprimado de opinioj, kiun trudas kelkaj registaroj, kiuj tion vidas kiel minacon anstataŭ naturan rimedon, «minejo el kiu venos la grandaj antaŭenpaŝoj de la estonteco». Li postulis internacian komitataton por alvoki al la konsciencoj de tiuj registaroj, kies civitanoj estas senigitaj de la rajto al libera esprimado.

La rezultoj de unu aparta formo de tiu libero estis la temo de krimologo, Berl Kutchinsky, en sociologia referaĵo pri tio, kio okazis, post kiam oni liberigis de cenzuro pornografion en Danlando en 1967. Post komenca rapida kresko, la vendokvanto de erotika literaturo preskaŭ subite malpliigis. Aliflanke, ia socia valoro indikiĝis: dum krimo ĝenerale kreskis post 1967, seksaj krimoj malpliigis — deliktoj kontraŭ junaj personoj per du-trionoj — kio sugestas, ke kelkajn krimojn oni povus eviti se anstataŭa sperto estus havebla. La danan principon, ke la leĝoj devas protekti individuojn sed ne sistemojn de moralo, oni ĝenerale aprobis.

\*

FORIGANTE KONFUZON PRI  
GRUNDNOMOJ

La organizo FAO de UN kaj Unesko eldonis mapon de la grundoj de Sudameriko. Ĝi indikas 60 ĉefajn grupojn de grundo, kaj la sekvantaj volumoj, kiuj pritraktos la reston de la mondo, devus forigi multe el la konfuzo kaj ripetado, kiuj nun regas pri la nomoj de grundoj. Ekzistas, ekzemple, ĉirkaŭ 40 nomoj ĉiutage uzataj por la melhelaj argilaj grundoj, kiuj estas komunaj al tropikaj kaj subtropikaj regionoj. La nova mapo klasifas, difinas (kaj forigas) inter ĉi tiuj. Elektante kiel nomi iun grundon, oni kiel eble plej multe sekvis la tradicion. De la komenco de la laboro, antaŭ 11 jaroj, oni konsultis 300 grundsciencistojn, inter ili la plimulton el la ĉefaj spertuloj de la mondo. La vortoj sur la mapo estas en 4 lingvoj: la angla, franca, hispana kaj rusa.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

## Recenzoj

## REELDONOJ

Oni devas ĝoji, ke ankaŭ Esperantaj libroj tiom vendiĝas, ke ili fine elĉerpiĝas. Tiun sorton havis pluraj popularaj libroj. Sed domaĝe ja estas, ke novaj esperantistoj tiel ne povas akiri ilin. Nun kelkaj klasikaj verkoj estas reeldonitaj, kaj ni esperas, ke pluraj baldaŭ sekvos.

En 1969 aperis ĉe Forumo Esperanto en Helsinki «*La Verda Koro*» de Julio Baghy, facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio, por komencantoj, por daŭrigaj kursoj, kiel informas la

subtitolo. Temas pri tre facile legebla libro, okdekpaĝa, vera perlo por nova esperantisto. Prezo: 5 markoj.

Pli multekosta kaj multe pli eleganta estas la novelo de novelaro «*Trans la Fabeloceano*» de Ferenc Szilágyi, libro, kiu aperis antaŭ kvardek jaroj. Ankaŭ ĝi estas facile legebla, la stilo estas vigla kaj verva, kun enhavo interesa ne nur al infanoj, sed ankaŭ al plenkreskuloj. La bindo estas bela kaj ŝajne fortika, la libro ampleksas iom pli ol 130 paĝojn, la prezo estas 23 danaj kronoj. La eldonejo estas Dansk Esperanto-Forlag en Åbyhøj, la jaro de la apero 1972.

Freŝe el la presmaŝinoj aperas ĉe Dansk Esperanto-Forlag du pliaj libroj en represo, nome «*Printempo en Aŭtuno*» de Julio Baghy kaj «*Infanoj en Toronto*» de Stellan Engholm. La libro de Engholm nun aperis en sia tria eldono. Tiuj ĉi du libroj ne estas binditaj. La libro de Engholm enhavas 100 paĝojn, tiu de Baghy 116. Ambaŭ kostas 15 kronojn.

Ni gratulas al la diligenta dana eldonejo kaj ties ĉefo, s-ro L. Friis, pro tio ke ili meze en fervora eldonado de novaj kaj originalaj verkoj ankaŭ trovas tempon por reeldonado. Kelkaj libroj devas ne forgesiĝi, kaj jen la ebleco por centoj kaj centoj de esperantistoj ekkoni tiun literaturon. Ni rekomendas ĉiujn kvar ĉi tie menciitajn librojn. JHR.

\*

## POEMARO

Miyamoto Masao: INVIT' AL  
JAPANESKO. Antaŭparolo de  
William Auld. Stafeto: Beletraj  
Kajeroj 42. J. Regulo, Eldonisto,  
La Laguna, Tenerifo. 18,5 x 12 cm,  
110 p.

Kiam mi prenis en la manon tiun ĉi poemaron, mi tuj ekpensis pri la revoluciuolo Miyamoto, sed mi trovis la lirikiston. Li mem kvazaŭ averte dediĉas: «Nur temas pri beletro». Estas agrabla konatigo. La poemoj ampleksas grandan registron de homaj travivaĵoj — de frua junula amo: «Ce sombra bosko pri am' eterne juna mi ĵuris kun ŝi», kaj rezigne: «Si baldaŭ iĝis edzin' alies, ho ve, mi deksepjara suspiris nur senpove», ĝis matura vivo: «Kun mi dividis edzin' alies liton», kaj fine peza bedaŭro pri aĝo: «Svebado lara sub plumb' ĉiela — mi ĵus kvindek kvin-jara». Unu el la suproj de la poemaro estas laŭ mi estas «La rememoro jam fora», lia reveno al la loko de sia junula amo:

Mi grimpe venis  
apenaŭ senanhela  
al lok' konata,  
sed la aŭtun' jam fridas  
sur la ruĝ' kastela.

Fadena temo de la kolekto estas lia reveno al la hejmloko, ni komprenas, de militservo: «Post jaroj venis mi al loko kara», kaj inter tiuj poemoj oni trovas verajn perlojn de naturpriskribo en la Esperanta liriko.

Ueyama Masao donas instruan eksplikon pri la japanesko. Oni povis ja iam kaj iam vidi en la gazetoj hajkojn kaj utaojn, sed per tia kolekto oni familiariĝas kun tiu poemformo kaj estas eĉ pli ĉarmata de ĝia facila japana etoso.

Miyamoto permesas al si kelkajn neordinarajn, surprizajn formojn. Nu, poeto rajtas eksperimenti, kaj nia lingvo tiel povas nur riĉiĝi, adoptate de poetoj de ĉiam aliaj mondpartoj kun apartaj lingvokutimoj. Tamen, jen novaĵo: «malneologisto», «Neologisto» (= neologo) oni povas akcepti analoge al «neolog-

ismo», eĉ se PIV ne registris ĝin — ĝis nun, sed «malneologisto»? EAH

## NOVAJ SERIOJ DE POSTKARTOJ

Fremdlingva Eldonejo en Pekino eldonis tri novajn seriojn da poŝtkartoj, ĉiuj bele presitaj, ĉiuj sur ne sufiĉe fortika kartono, ĉiuj temantaj pri revolucia balcto kaj revolucia opero. Li titoloj estas «Ruĝa Virina Taĉmento», «Ruĝa Signal-lanterno» kaj «Sagiabank».

## TURISTBROŝURO

«Turisma Bulgario» estas tre bela broŝuro eldonita de la Centro por Turisma Reklamo ĉe la Komitato de Turismo, pl.Lenin 1, Sofio, Bulgarujo. Bona papero, bona preso, utilaj informoj.

## FIAT 850

Denove la italaj aŭtofabrikoj FIAT eldonis broŝuron en Esperanto: «850 FIAT, Aŭto plej aktuala». Bonega papero, bonega preso. Paperkanonoj devus nun direktiĝi al FIAT en Torino por peti tiun broŝuron, ĉar ĝuste la grandegaj firmoj povos rapidigi la veran uzon de la Internacia Lingvo. Sed la unua postulo estas, ke ni, la esperantistoj, montras intereson, kiam tia firma montras emon fari tion, kion ni ĉiuj esperas . . .

## LA VOĈO DE HO CHI MINH

El Vjetnamo venis broŝurita libro kun la titolo «Anekdotoj de vojaĝo aŭ Prezidento Ho Chi Minh rakontas» de T.Lan. La Esperanta lingvaĵo de la traduko estas tre bona, la libro interesa kaj leginda (se oni povas gluti la «banditojn» kaj similajn vortojn). La ilustraĵoj ne estas bonaj.

## AKTUELT OM ESPERANTO

Bona danlingva broŝuro informa, kies titolo aperas ankaŭ en Esperanto. Amuzaj desegnaĵoj, mallongaj kaj koncizaj informoj, agrabla prezentiĝo. La tuta presajo, kiu estas eldonita de Esperantoforeningo for Danmark, estas tiel agrable-efika, kiel povas esti informa kaj varba broŝuro.

## UNESKO-novajoj

## UNESKO ELDONISTO

Specimeno tipa de tio, kion kredeble nur Unesko povas fari, estas la *Index Translationum*, internacia bibliografio de tradukoj. Komenciĝinte en 1950 per 8 750 eroj, ĝi nun atingis sian 22an volumon kaj entenas informojn pri 37 172 titoloj en 66 landoj. La *Index* povas doni respondon al tiaj demandoj, kiaj: Kiu lando havas la rekordon de tradukoj? Kiuj aŭtorojn oni plej multe tradukas? En kiom da lingvoj oni eldonis la Biblion? «Nur Unesco povas demandi kaj akiri ĉi tiun specon de informo,» diris S-ro Thorp (administranto de distribuo de la Buroo de Unesko por Dokumentoj kaj Eldonado). «Privata eldonisto renkontus baron. Ni posedas la vojojn de komunikado.»

Alia libro multe utiligata estas «*Study Abroad*» (Studu Eksterlande). Oni regule modernigas ĉi tiun eldonaĵon (simile al la Gvidlibro Michelin). Ĝi provizas informojn pri internaciaj stipendioj kaj kursoj por 126 landoj kaj teritorioj. Ĉi tie denove pro la uzo de la rimedoj de Unesko, «*Study Abroad*» kaj ĝia kunulo-libro «*Vacation Study Abroad*» (Studu Eksterlande dum Ferioj) estas

vendataj je prezo ne tro alta por la biletoj de studento aŭ de biblioteko kun malgranda budĝeto.

Por celebri 25 jarojn de eldonado oni nun preparas dikamamasigitan katalogon kun titolo «*25 jaroj de Unesko-Eldonado*». Ĝi listigas 5 000 ĝis 6 000 titolojn. Gravan lokon en tiu katalogo havos la libroj eldonitaj sub la «Programo de Unesko por Literaturaj Tradukoj». Ĉi tiuj libroj, plejparte tradukoj en angla aŭ franca lingvoj, fontas el 60 malsamaj literaturaj lingvoj, kiuj reprezentas ĉirkaŭ 40 aziajn kaj 20 eŭropajn lingvojn, se ne menciis la ne-slavajn literaturajn de Sovetio kaj multajn afrikajn literaturajn.

## LA MONDO ELSPEZAS ĈIUN JARON \$ 200 MILIARDOJN POR MILITAJ CELOJ

Laŭ raporto de internacia komitato de UN, oni kalkulas, ke kosta 200 miliardojn da dolaroj ĉiujare provizi per nutraĵoj kaj armiloj la 23 milionojn da homoj en la militistaroj de la mondo. Ĉi tiu primitiva elspezo estas pli granda ol la kunigitaj enspezoj de triono el la tuta loĝantaro de la mondo, t.e. de la 300 000 000 enloĝantoj de Afriko, Sudafriko kaj la Fora Oriento, laŭ broŝuro de UN, kiu donas la eltrovaĵojn de la komitato. La tutmonda elspezo pri armiloj, homoj kaj esplorado postulas de 6 ĝis 6,5 el cento de la tuta produkto de la mondo, du-kaj-duonfoje tion, kion elspezas ĉiuj registaroj pri sano; unu-kaj-duonfoje tion, kion ili elspezas pri edukado; kaj tridekfoje la oficialan elspezon helpe al la ekonomio de evoluantaj landoj, laŭ la broŝuro: «Ekonomiaj kaj Sociaj Sekvoj de la Primitiva Konkurenco kaj de Primitiva Elspezo.» Dum elspezas registaroj

ĉiujare \$ 25 miliardojn pro primitivaj esploroj, laŭ la 51-paĝa broŝuro, ili dediĉas nur \$ 4 miliardojn al medicina esploro. La komitato de 14 homoj konsistas el scienculoj kaj ekonomikistoj el landoj okcidentaj, orientaj kaj evoluantaj. La plejparton (pli ol kvar kvinonojn) de la mono elspezas ses landoj: Usono, Sovetunio, Francujo, Britujo, Popola Respubliko de Ĉinujo, kaj la Federacia Respubliko de Germanujo. Plie, la komitato kalkulas la nombron de homoj, kiuj implikiĝas rekte aŭ nerekte en laboron kun primitivaj celoj je 50 milionoj, proksimume la ekvalento de la enloĝantaro de Francujo. Entute, la tutmonda stoko de nukleaj armiloj egalas almenaŭ 15 tunojn de TNT por ĉiu homo sur la planedo.

## LA BUTIKO

Ĉe la redaktoro en Sarpsborg estas nun vera poŝtmarka butiketo. Responde al nia alvoko en la unua aŭtuna numero de la gazeto alevnis pluraj mendoj. Ni tial devas nun konstati, ke la tuta stoko da usonaj poŝtmarkoj elĉerpiĝis.

Ni forte rekomendas la pakajetojn diversprezajn, kiuj devus esti tre uzablaj kiel donacoj al geknaboj por naskiĝtagoj — kaj por la kristnasko. Prezoj de 5 ĝis 100 kronoj.

Red.

## MONO DE LA KOMUNUMO

En Sarpsborg la gazetoj ĵus informis, ke La Urso, la Esperanto-klubo de la urbo, ricevos de 1973 monon de la komunumo. La klubo petis al la komunumo, pere de la Kulturkomitato, pri konsubteno. Antaŭ unu jaro, kiam la

klubo festis la dudekjaran jubileon, oni invitis la prezidanton de la Kulturkomitato, kaj tiu transdonis florojn kaj konstatis, ke la klubo faras vere kulturalan laboron.

Tion ĉi ni informas, esperante, ke aliaj kluboj povos utiligi tiun vojon al konsubteno, montrante al tio, kio okazis en Sarpsborg.

## PRI INFORMOJ

Mi legis en la antaŭa numero de nia gazeto pri la nova dana Esperantogazeto, kiu havas bildon pri nudulino, kaj mi permesas al mi jenan demandon al la saĝa Hipopotamo: Kial aperigi nudan virinon en Esperanta gazeto? Kial entute tiu granda intereso pri tio en ĉiuj gazetoj?

Sciola

La kaŭzo estas klara: ĉiu gazeto devas interesiĝi pri informoj.

Hipopotamo

## KAMPANJO REISÆTER!

Karaj gesamindeanoj! Vi certe memoras la alvokon de Trygve Reisæter kaj mi antaŭ unu jaro: «Kie troviĝas la oferemaj esperantistoj?» La kampanjo donis ĝis nun la rezulton je 1600 kronoj. Sumo kiu ne estas tro granda, kaj ne donas tro multajn eblecojn por ekagado por nia movado en Norvegujo.

Vi havas ankoraŭ la sanĉon partopreni. Montru vian admiron por la liga estraro kiu konstante kaj fervore laboras por Esperanto en Norvegujo. Montru vian oferemon! Sendu hodiaŭ vian kontribuon. Temas pri 100 kronoj ĉiujare dum tri jaroj. Bonvenigas vin en niajn vicojn: Trygve Reisæter kaj Elna Matland.

# NORVEGUJO 1100-JARA

SNORRE PRI LA BATALO ĈE HAFRSFJORD 872

Disvastiĝis la famo, ke viroj el Hordalando, Rogalando, Agdujo kaj Telemarko kolektiĝis kaj proponis kaj ŝipojn kaj armilojn kaj virojn. La iniciantoj al tio estis: Ejrik, reĝo de Hordalando, reĝo Sulke el Rogalando kaj Sote Jarlo, lia frato, Kjotve riĉulo, reĝo de Agdujo kaj Tore Haklang, lia filo, kaj el Telemarko du fratoj, Roald Dorso kaj Hadd Malmolulo. Sed kiam Harald eksciis pri tio, li kolektis armeon kaj surmarigis la ŝipojn, kaj pretiginte la armeon rapidis suden laŭ la lando kaj kolektis multajn virojn en ĉiu gubernio. Kiam li pasis Stad, reĝo Ejrik eksciis pri tio; ankaŭ li jam kolektis la potencon, kiun li povis atendi, kaj nun li iris suden renkonte al la armeno, kiu laŭ lia scio venos al

lia helpo el oriento. La tuta armeo renkontiĝis norde de Jæren kaj velis en la Hafrsfjordon. Tie reĝo Harald jam estis kun sia armeo. Tuj komenciĝis granda batalo, kiu estis kaj longedaŭra kaj forta, sed fine reĝo Harald venkis, kaj jen mortfalis reĝo Ejrik kaj reĝo Sulke kaj Sote Jarlo, lia frato. Tore Haklang metis sian ŝipon kontraŭ tiun de reĝo Harald, kaj Tore estis granda berserko; tie ili forte atakis ĝis Tore Haklang mortfalis; poste ili malplenigis lian tutan ŝipon, kaj reĝo Kjotve fuĝis al insuleto, kie estis bona kondiĉo por defendo, kaj poste fuĝis la tuta armeo, kelkaj perŝipe, aliaj laŭlande suden laŭ Jæren. Tiel diras Hornklove:

Ĉu vi aŭdis pri akra atako en Hafrsfjordo,  
reĝo el rank' de gigantoj kun Kjotve riĉulo?  
Ŝipoj alvenis el oriento malpacon atendantaj  
kun kapoj grincantaj kaj gravuritaj ŝildoj.

Plenaj de batalantoj kun brila ŝildaro,  
kun lancoj longaj kaj glavoj gigantaj.  
Bruantaj berserkoj pensis pri bravaĵoj,  
ululis furioze ferarmiloj brilaj.

Ili provis kuraĝulon, kiu lernis kuri,  
estro de orientuloj, loĝanto sur Utstein.  
Li venis velŝipe, atakon atendante,  
hakiloj frapadis ĝis Haklang falis.

Tiam li devis defendi la landon kontraŭ Luvo,  
la dikkola dignulo, insulon al ŝildo li uzis.  
Subglitis sub sidilojn kiuj vundiĝis,  
vizaĝoj al fundo, femuroj nun supre.

Belaj ŝildoj brilis malantaŭe,  
ŝtonoj ŝutiĝis super timemaj malamikoj.  
Fortuloj forflugis timante laŭ Jæren,  
hejmen el Hafrsfjordo, soifantaj je bicero.

Post tiu batalo Harald ne plu renkontis kontraŭon en Norvegujo, ĉar ĉiuj liaj plej grandaj malamikoj falis. Sed kelkaj forfuĝis el la lando, kaj tiuj estis multaj, ĉar tiam ili kulturis grandajn senhomajn landojn. Tiam ili ekloĝis en Jamtlando kaj Helsinglando, sed tie jam loĝis kelkaj norvegoj. Dum la malpaco, kiun reĝo Harald havis antaŭ ol li konkeris tutan Norvegujon, oni trovis kaj ekkulturis kelkajn forajn landojn, Fero-

ajn insulojn kaj Islandon; multaj ankaŭ iris al Hjaltlando. Multaj potenculoj fuĝis pro reĝo Harald en senpaco kaj iris vikinge al okcidento. Ili estis sur Orkninsuloj kaj Suderinsuloj vintre, sed somere brulrabis en Norvegujo kaj faris tre grandan detruon tie. Sed ankaŭ estis multaj potencaj viroj, kiuj servis al reĝo Harald kaj fariĝis liaj viroj kaj konstruis la landon kun li.

Trad. H. A. Rosbach.

## † FORPASIS SYNNØVE WALRAAMOEN

La 5an de Oktobro subite forpasis pro koratako s.ino Synnøve Walraamoen, la

edzino de la konata loka kaj esperantista poeto Kjell Walraamoen en Alvdal. Sinceran kondolencan al la edzo kaj la cetera familio.

C. S.-B.

## AL SYNNØVE

Pluvetis hodiaŭ.

Li diris:

«Ne eblas iri  
al la kampo.  
Mi laboros ĉe  
la skribotablo;  
eble pli poste  
la suno aperos».

Kaj montris al  
mi la poemon  
«Postkanteto».

Ŝi diris:  
«Dimanĉon okazos  
Konfirmacio de  
nia nevo.

Kiun ĉemizon  
vi volas surmeti  
por la festo?»

Perfekta trankvilo  
regis la domon  
kiam aŭdiĝis ploro.  
«Kio okazas?»  
Kaj li:  
«Urgas iri al  
doktoro.  
Synnøve malbone  
fartas».  
Rapidis aŭtomobil'  
survoje,  
kaj ŝi estis  
en miaj brakoj.  
Dume sigeliĝis  
ŝia sorto.


Lina Gabrielli

Al Synnøve Holm Walraamoen,  
5.10.72.

## FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubbyen 22, Oslo 9  
Redaktoro: Odd Kolbræk.



### LOM PRI LA AŬSTRIA FERVOJMUZEO EN VIENO (Daŭrigo kaj fino)

Korbsignalo ankaŭ troviĝas, t.e. 4—5 m altaj mastoj kun transversa stajo. Sur la pinto estas metitaj takeloj por tirado de ŝnuraĵo. Tien leviĝis diversaj ruĝpentritaj korboj kaj bareloj dum la tago, aŭ lanternoj dum la malluma parto de la tagnokto. Tiu signalsistemo devenas de la linio Graz—Köflager de la epoko 1860—1879.

Cetero oni vidas modelojn pri regadejoj kaj de lumigadsignaloj kaj de ilia evolado, ankaŭ pri en- kaj antaŭurbaj tramoj kaj de telferoj, kies tasko estis transporti ercon de minejo en la montaro al fore situanta fervojstacio, de kie la fervojo transprenas la transporton al la fandaĵo. Ĉiuj modeloj funkcias, kiam oni premas certajn butonojn.

### TRAJNPFAĴO EN JAPANIO

La japanaj fervojoj komencis en novembro 1971 la konstruadon de retparo de nova fervojlinio destinata al «Trajn-pafaĵo» — rapidaj trajnoj kun rapideco de pli ol 200 km.p.o. horo.

La fervojlinio havas longecon de 496 km., devas esti finkonstruata antaŭ 1976 kaj la konstruado kostos 2,7 miliardoj da U.S. dolaroj. Ĝi kunligos Tokio kaj Morika.

La plej longa fervojtunelo en la mondo konstruiĝas en Japanio. Ĝi kunligos la

insulojn Homŝu kaj Hokajdo. Ĝia longeco estas 54 km. el kiuj 23,3 km. situos sub la marfundo. Ĝi longos 2 km. pli ol la projektita tunelo sub la kaleza markolo (inter Anglio kaj Francio).

El Bulteno de G.E.F.A.

*Aŭto kaj lokomotivo samtempe.*

Plurjara esploro-programo sukcese finiĝis per oficiala agnosko flanke de la Germana Federacia Fervojo (DB) por du aŭto-tipoj kiel trak/ŝoseaj veturiloj: Unimog kaj Ford Transit. Kun la samaj pneŭmatikoj ili povas veturi kaj sur trako kaj sur ŝoseo. Por surtraka moviĝo la stirilo estas blokata en meza pozicio kaj la gvidan rolon de radflangoj transprenas kvar ŝpurteniloj kiuj glitas respektive rulglitas laŭlonge de la realkapa interflanko tuj malantaŭ la radoj. Tiu dumedia mekanismo estas pneŭmate levebla por ŝosea veturado, por surtraka uzo ĝi malleviĝas per propra pezo kaj estas riglata en malsupra pozicio. La medioŝanĝo daŭras ne pli longe ol 1 minuto. Se surtraka uzo estas pli ofta ol surŝosea, oni povas munti specialajn portrakajn pneŭmatikojn. La rapideco surtraka estas limigita al 70 km./h.

La uzeblecoj por ĉi tiuj veturiloj estas multflankaj. Sur privataj aliĝtrakoj ili povas treni kaj manovri vagonojn (ĝis 300 t.) la Unimog kun speciala vagon-

bremsa povas trakcii), en la fervoja servo ili povas funkcii kiel motordrezinoj aŭ inspektveturiloj. La Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) jam ricevis 40 tiajn veturilojn, la Sveda Ŝtatsfervojoj (SJ) planas la ekuzon de 250 ekzempleroj. Ĉe la Germana Federacia Fervojo (DB) nun funkcias 10 dumediaj veturiloj, unu el ili jam rulis 20 000 km. sur reloj. Kelkaj provaj veturiloj troviĝas en suda Ameriko kaj Irano.

## Pa Norsk

### ESPERANTO I COLOMBIA

Ved universitetet i Medellín i Colombia i Sør-Amerika har man på nytt startet kurs i det internasjonale språket Esperanto. Det er direktøren for de språklige avdelingene ved universitetet som leder kurset, det meldte seg 500 studenter, men bare 70 kunne opptas i denne omgang.

### RUSSISK FORFATTER MED ESPERANTO

Den russiske forfatteren Isakovski, bl.a. kjent for sangen «Katusja», har nylig utgitt sin selvbiografi. Der vier han et helt kapittel til Esperanto og ungdomstiden, da han fattet interesse for det internasjonale språket og ble esperantist. En del aviser som pleier ha Esperanto-spalter, har gjengitt hele kapitlet.

### ESPERANTO OGSÅ I SUDAN

Afrika kommer også etterhvert med i Esperanto-bevegelsen. I Khartoum er det stor interesse for det internasjonale språket blant studentene ved universitetet, og

medisinstudentenes organ «El Haakem» pleier ha flere sider med Esperantostoff.

### MER ENN 5 000 RADIO- SENDINGER PÅ ESPERANTO

er i løpet av de siste 10 årene gått ut over Polsk Radio i Warszawa. Sendingerne har vært omfattet med stor interesse av lyttere i mange land, det viser de mange henvendelser som Polsk Radio til stadighet får fra lyttere som behersker det internasjonale språket Esperanto. Det arrangeres hvert år fra den polske kringkastings side spennende konkurranser blant lytterne, på grunnlag av det de har hørt i programmene. De skal svare på spørsmål om polsk turisme, næringsliv og kultur, og premie er verdifulle: reise og opphold i Polen, dessuten flotte souvenirer.



### TOMAS PUMPR MORTIS

La 10-an de septembro mortis en la aĝo de 66 jaroj D-ro Tomáš Pumpr, membro de la Akademio de Esperanto kaj de la Ekzamena Komisiono, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

## Norvega Kroniko

### Esperanta renkonto sur Haukeli-monto

Por la duo fojo (la unua fojo estis lastjare) esperantistoj renkontiĝis en Haukelisetter Fjellstue. Tio okazis sabaton kaj la 30an de septembro kaj diman-

ĉon la unuan de oktobro. La aranĝanto estas la nova estraro de la okcidenta distrikto, kiu nun estas en Sauda. Alvenis 48 personoj (el Bergen, Kristiansand, Haugesund, Odda kaj Sauda).

La renkonto komenciĝis per festa kunigo sabatvespero. Ole Rønnevig de Haugesund montris vere belan kolorfilmon de Portland kaj la kongreso kaj de sia vojaĝo tra pluraj ŝtatoj en Usono. Norman Birkeli ludis memkomponitajn melodiojn per Harding-fele. Poste ni distris nin per kantado, muziko, dancado, kaj sorĉado de Johan Matland.

Dimanĉe, antaŭtagmeze, ni kunvenis en la kela salono. Olav Thormodsen rakontis pri tiaj impresoj de la kongreso en Portland. Poste ni diskutis la aŭtunan klubagadon. Elna Matland gvidis la kunvenon. Ŝi opinias, inter alie, ke la ĉefa laboro nun por la kluboj estas havigi Esperantajn librojn en la bibliotekojn. Laŭ estraro propono ŝi rakontis kielmaniere tion fari.

Ni ankaŭ faris komunan piedekskursion en la montaro en bela vetero. La renkonto finiĝis je la 16a horo. Sukcesa aranĝo, kiu donas al la partoprenantojn pli bonajn kontaktojn, kaj esperable ideojn kaj impulsojn por la klubala laboro en la venontaj monatoj.

## Sauda

Kluba kunveno la 18an de septembro ĉe ges. Andersen. Johan Matland montris al ni belajn kolorbildojn de feria vojaĝo en Usono, kie li kaj lia edzino estis ĉi-somere.

«Lingva duonhoro» gvidata de Olav Andersen. Montriĝas ke tiu ĉi duonhoro estas bona ekzerco, ĉar estas ĉiam vortoj

kaj esprimoj, kiuj estas malfacile tradukeblaj, ĉu norvegen, ĉu esperanten.

Klubkunveno 16/10 1972 ĉe s-ino Karen Berge. La prezidantino malfermis kaj gvidis la kunvenon. Ni inter alie decidis mendi 200 propagandbroŝurojn pri Esperanto. Estas du diversaj specoj de ili, kaj ni do mendos po cent el ĉiu speco. Disdoniĝis broŝuroj pri la kongreso en Beograd. Kelkaj klubanoj enpagis siajn kotizojn al U.E.A. por la venonta jaro.

Arthur Bjerke kaj lia edzino vojaĝis al Norda Norvegio dum la ferioj, kaj li rakontis kaj montris kolorbildojn pri tiu vojaĝo kiu okazis per ŝipo tien, kaj per aŭto reen.

En la lingva duonhoro, kiun tiun-ĉi fojon gvidis Elna Matland, ŝi intervjuis la aliajn klubanojn, demandate, kie ili pasigis siajn feriojn. Ili devis respondi kaj rakonti pri tio esperantlingve. Kion ili ankaŭ faris.

*Sekr.*

## Sarpsborg

La Urso regule kunvenas ĉiun duan merkredon. Oni ĉiam komencas la kunvenon per tuthora instruado, kaj tiu instruado ĉiufoje estas adaptita al la lingva nivelo de la ĉeestantaj membroj aŭ gastoj.

La ĉefprogramoj estas prelegetoj aŭ ĉapitroj el la nova libro, kiun estas verkanta la prezidanto. La titolo de la libro verŝajne estos «Ordinaraj indianoj», kaj la libro nun estas duone preta.

La prezidanto ankaŭ rakontis pri sia somera restado en la dana insulo Born-

holmo, kie li fervore fotografis.

En ĉiu kunveno ni okupiĝis pri la ŝakludo de la redakcio de Norvega Esperantisto, kaj en ĉiu kunveno premioj estas disdonitaj.

La klubo perdis siajn junajn membrojn, kiuj faris la studentan ekzamenon kaj forlasis la urbon. Ni nun invitos novajn junulojn.

## LASTMOMENTE

Ni povas nun liveri okcidentgarmanajn poŝtmarkojn por po 10 øre. Neesperantistoj: po 15 øre.

Norvegaj bildpoŝtmarkoj troviĝas ĝuste nun relative grandstoke. Prezo provizora (t.e. por la plej rapidaj memantoj): po 10 øre. Por vendo al neesperantistoj: po 15 øre.

Nabaj bildpoŝtmarkoj (serioj) nun denove havelloj (pentroj, aŭtoj, astro-naŭtoj ksp.).

## Korespondu

Komencanto deziras trovi geamikojn en via lando. Hobioj: prospektoj kaj etiketoj, aŭtomobiloj, numismatiko kaj antikvaĵoj. D-ro de med. Michal Rovder, Halič — OZS, okr. Lučenec, Ĉeĥoslovakujo.

Mi deziras korespondi kun esperantistoj el via lando. Mi havas 37 jarojn, kaj mi estas dekoranto-pentristo. Mi kolektas revuojn, bildkartojn pri pentraĵoj k.t.p. Torró Vilmoš, Str. Zorilor n.ro 1, Covasna, Rumanujo.

Komencanto 17-jara volonte korespondus kun samaĝuloj. König Márta, Szekszárd, Gróf Pál u. 19, Hungarujo.

Bulgara esperantisto volas korespondi kun norvegaj geesperantistoj por interŝanĝi malnovajn monerojn kaj monbiletojn. Pejo Raev Peev, Str. D. Grekov 3, Pazarĝik, Bulgarujo.

22-jara studento dezirus korespondi kun esperantist(in)o o j el via lando. Mi amas muzikon, literaturon, naturon. Péter Erdős, PF. 106, Budapest 112, Hungarujo.

Mi deziras korespondi kun norvega esperantisto. S-ino Mgr. Jana Szpakowska, Partyzantów 109, Bielsko-Biala, Pollando.

## NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30  
Turisma Servo: Boks 942, Oslo  
Postgiro 100.32

## ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:  
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:  
Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.  
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:  
Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar



